

Boulogne sur Mer
31, Boulevard Mariette
la 31^{an} de Marto 1924

Kara Samideano,

Dankon por via longa letero de la 9^a t.m. + ankaŭ por via bela P.K. de Přelouč de la 26^a de Feb. kun portreto de la librovendisto de Přelouč.

Mi estis en Parizo kien mi iris por aĉetaĵoj kiam via letero alvenis sed mi trovis ĝin plezure je mia eniro.

Mi ne estas alkutimata vidi vian manskribon de post unu jaro (3 aŭ 4 foje en unu jaro) + tio ŝajnis tute nova. Dankon ankaŭ por interesa landkarto kun ruĝe subskribitaj urboj viditaj de mi aŭ kiuj povis interesigi min. Mi vizitis ankaŭ Cheb (dufoje) + vidis, trapasante, Plzen (kie oni povis ricevi malfacile bieron). Znojmo interesigas min ĉar antaŭ 18 monatoj korespondanto tre fervora skribis al mi. Kiel multaj aliaj Ĉekoj li ĉesis. Mi korespondis kun Esp. el Přešov, Košice, Bratislava, Teplice, sed neniu el ili daŭris skribi. Tiu landkarto estas tre interesa – grandan dankon.

Mi multe legis pri la festo Smetana. Mi memoras ke lia nomo estis grande skribita sur la orgenoj en Reprezenta Domo en Praha. Kiaj belegaj orgenoj + kiel tio kion oni ludis impresis min.

Dankon pri ĉio kio vi klarigis pri Smetana + pri via historio. Mi tute komprenas vian entuziasmon por tiuj-ĉi aferoj. Mi admiras tion. Mi tuj rimarkis tiun entuziasmon en Praha ĉe Esp. kun kiu ni tagmanĝis la 1^{an} tagon de nia alveno en Praha. Li nur parolis pri tio tiel li ĝojis pri la historiaj ŝanĝoj en sia lando.

Vi certe estos "lu"en politikoj, iam – urbestro aŭ Parlemtano, se vi ĉeestas tiom da politikaj kunvenoj.

Vi tute sukcesis komuniki vian ĝojon pri via lando al mi + mi precipe dankas vin ĉar vi deziris komuniki ĝin al mi. Estas tiel malofte nuntempe ricevi leteron en kiu oni ĝojas pri la ŝtataj aferoj – Poloj, Meksikoj, Angloj, Austrioj, Germanoj, Svedoj, k.t.p., ĉiuj ĉiuj plendas. Nur vi kiu ĝojas !!!

Dankon por senditaj P.Markoj. Ili estos ĉiam utilaj. Post morgaŭ oni pli altigas nian poŝttarifon: anstataŭ ol 0,50 estos 0,75 por fremdaj leteroj + 0,45 anstataŭ ol 0,30 por P.K. Tio estas multe. Feliĉe ke dank'al Millerand kaj al aliaj nia franko iom pli valoras.

Mi forte esperas ke via Eveto tute povas marŝi post la forlaso de la gipso – unue, sendube, ŝi estos tute stranga + ne scios bone, rekte marŝi, sed tio baldaŭ revenos. Baldaŭ tri jaroj ŝi havos! Ŝi certe devas esti beleta + amuza. Beleta aĝo, ĉu ne?

Ni jam sendis niajn aliĝojn al Wien + mi korespondas kun D^{ro} Sós (vi memoras lin) + desegnisto el Wien. Sendube, mia 6 jara fidela korespondanto S^{ro} Guerra el Meksikujo tie estos. Mi neniam vidis lin. Sed, ŝajnas al mi ke mi tiel bone, amike konas lin. Mi havas nun 120 leterojn de li en 5 jaroj + 7 monatoj. Li vizitos nin hejmen ankaŭ. Lia edzino venos Eŭropon antaŭ li + vizitos nin ankaŭ la proksiman monaton. Sed ŝi forveturos Meksikujon antaŭ la Kongreso, ĉar ili ne povas forlasi duope, pro danĝero en Tampico, fajroj + ŝtelistoj ĉe la centra Poŝtejo kie li estas Estro.

Poste, mia korespondanto D^{ro} Broder el Warszawa iros Wienon post restado ĉe ni, ĉi-tie, dum vojaĝo tra Francujo. Mi eĉ ne vidis lian portreton.

La familio Zamenhof, espereble krom la Majstrino, D^{roj} Leono + Felikso ankaŭ. Tiu Kongreso ŝajnas estonta tre sukcesa, ĉu ne? Ĝi estas tre malproksima por mi + mi ĉiam timas ke io (kaj ne "Ĝi" kiel vi tiel ofte skribas anstataŭ io aŭ tio) ne malhelpu mian ĉeeston. Vi do vidas ke mi esperas vidi + revidi multajn korespondantojn de long'jaroj.

Tamen mi estas certa ke ni povos babiladi en nia kara lingvo kiun mi tute ne parolis de post Praha !! kun vi!

Jen, mi estas malfeliĉa. Mi iris al Parizo malvarmumita (tion mi ne devis fari). Poste, mi estis pli malsana + nun de 3 semajnoj preskaŭ mi estas en unu ĉambro kun bronkito. Nun, mi fartas iom pli bone + leviĝas sed ne estas forta.

La vetero estas terura. Nune, falas fandita neĝo. Kruela malvarma vento blovas. Mi tute ne scias kiam mi povos eliri + mi sopiras por printempo, suno, varmo, floroj, blua ĉielo. Atendante estas vintro + ne estas burĝonoj sur arboj + oni portas vintrajn vestaĵojn.

Amikino mia sur la Riviera à Cannes, diras ke estas veteraĉo ĉe tiu kutime suna urbo.

Mi ne plu aboniĝos al E.T.¹ Mia abono finiĝos je N^o. 203 + mi ne plu prenos ĝin. Ĝi kostas en franca mono preskaŭ unu frankon + ne plu estas tiel interesa kiel antaŭe.

En Parizo, mi vidis kelkajn Esp. S^{ron} de Ménil, komponisto de "l'Espero". Mi bone konas lin. Ankaŭ Generalon Sebert, li fariĝas tre maljuna sed tamen rememoras min. Fraŭlinon Gérard ĉiam tiel agema + aliajn.

Mi aĉetis + vidis belaĵojn. Parizo estas bela luma, bela!! La perspektivoj estas mirindaj.

Mi vizitis la tombon de la "Portu inconnu" sub l'Arc de triomphe kun ĝia neniam estingigota fajro. Mi iris teatrojn k.t.p.

Nun, kara Samideano, mi forlasas vin, sendante al via Edzino miajn plej sincerajn salutojn + dankante vin por viaj vortoj, por via letero, por viaj pensoj, mi sendas al vi miajn amikajn pensojn.

Alice Sergeant

¹ Esperanto Triumfonta